# LA SKOLTA MONDO

NE ISSN 0037-8558



OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

NUMERO 13 VOLUMO 7 UNUA JARKVARONO 1992

Ĉi-jaro estas grava jaro por hispanparolantaj landoj k. por la tuta mondo: 500 jaroj pasis jam de kiam Kristoforo Kolombo "malkovris" la tiel nomatan "novan mondon". Sed, por ni geskoltoj, ĉi-jaro estas ankaŭ grava ĉar komencas la plenumado de la rezoluciojn adoptitaj dum la Monda Konferenco en Parizo. Temas pri la Strategia Plano 2002.

Tiu ĉi plano permesas nin rigardi kiel fartas nia propra grupo, distrikto kaj regiono. Oni devas respondi al la demandoj faritaj kaj projekti nian agadon ĝis tri jaroj estontece.

La tasko ne estas facila, ĉar ne ĉiam oni ŝatas vidi tion kion ni faras malbone, kaj certe fikso da celoj por la venontajn tri jarojn minacas nian trankvilan vivon, ĉar oni devos labori multe por atingi kelkajn el ili.

La S.P. 2002 konsistas en 4 broŝuroj, unu por ĉiu nivelo laŭ la kutima strukturo de niaj asocioj: grupo, distrikto, regiono aŭ zono, kaj naciskale. Respondinte la demandojn, kopion oni donas al la supera nivelo por ĝia propra planado kaj evaluado. Tiel ĉiu strukturo scias tion kion ĝi devas fari por la venontajn tri jarojn.

La esperanta versio de la demandaĵo de la du unuaj strukturoj estos pretaj je la fino de majo kaj junio respektive.

Originala versio nun uzebla tra la tuta mondo estis pretigita de Ĉilia Geskolta Asocio.

## PARDONON!!!!

Kiel redaktoro de nia bulteno La Skolta Mondo, mi devas pardonpeti al vi pro la neaperado de nia ligilo dum la pasintajn monatojn. Estis multaj personaj problemoj kaj aldoniĝis ekstra problemo kun la banko kaj en Britio k. en Ĉilio. Ĉio ĉi malpermesis min labori akurate kiel ni deziris. Do, mi dankas pro via pacienco kaj komprenemo!

Héctor.

## NIA SEKRETARIO EKSIĜAS POST BONEGA LABORO

Kun bedaûro, ni devas doni al vi ĉi tiun anoncon. Nia kara Sekretario David H. Withey eksiĝos. Li jam estas 70-jarulo kaj familiaj problemoj devigis lin eksiĝi . Certe li ne deziris tion fari, sed kiam la familio alvokas, la ceteraj aferoj devas kompreni prioritatojn. La Ligo bedaûras lian decidon, sed komprenas lin; lia laboro por SEL estis ja grava dum tre interesa tempo kiam la movado viglas denove en landoj kie skoltismo estis forta antaûe.
Ni certas ke David restos "ĉiam preta" por servi SEL kiam estos bezonate. Gratulagon!

## DEZIRAS KORESPONDI...

Jen BOMBARA, 18-jara knabo deziras korespondi tutmonde kun geskoltoj. Lia adreso estas Idanská 33/21, CS-04011 Košice, Ĉeño-slocakio.

**********

Hadi DJURITNO, komencanto de Esperanto, deziras korespondi kaj interŝanĝi e-ajn lerno- kaj legolibrojn. Lia adreso estas Esperanto Studado-Centro, Jl. Hglajo Lr. 5/11, Cepu - Centra Javo 58312, Indonezio.

**********

Piotr BRAJNIKOV, 16-jara knabo deziras serioze korespondi. Jen lia adreso: Stepana Rezina, 85/21; Permskaja )-Oblastj, 618120 Gorod Osa, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj.

**********

Jenja NAUMOV, 15-jara knabo ŝatus korespondi. Li interesiĝas pri filmoj, orientaj luktartoj, cigaredaj skatoloj k.t.p. La adreso estas ul. GJanvarja 26 A-10, Krasnojarsk 660049, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj.




## Spontana inform-kampanjo al sesmil junaj skoltoj pri Esperanto

Wolfgang Buchholzer raportas:

Mi legis en gazeto, Lastmonente por tiel diri, ke komence de aŭg-1991 okazus Internacia Skolt-ĵamboreo apud Vieno, sur monteto ĉe Klosterneuburg. Nomiĝas „Donau 91" - Danubo naŭdekunu.

Oni atendos preskaŭ sesmil skoltojn inter dek kaj deknaŭ jaroj, el 28 nacioj. Venis ekzemple el Svedio 40, et Finlando 70, el Skotlando 30, el Anglio 160, el Kanadio 14, el Italio 90, el Meksikio 30, el Taivano 20, el Cipro 12, el Japanio 40, el Sovetunio 10, el Pollando 90 kaj tiel plu.

Ĉar mi mem estis dum mia junuleco skoltgvidanto, mi ne volis preterlasi tiun eblecon por varb-agado surloke.

Mi tuj havigis multlingvajn informtekstojn kaj presigis sesmilojn da apartaj informfolioj, trimil germane, dumil angle, la reston en diversaj lingvoj: franca, itala, hungara, pola, ĉeĥa, eĉ japana, ĉar estos atenditaj 41 gejunuloj de tiu lando.

Feliĉe troviĝis en la tendaro belga geedzparo, nome **Bouman**, samtempe skolta kaj Esperantista, kiu jam estis varbinta pere divers-lingvaj presaĵoj. Ni kune, krome per helpo de samideanoj Vokal kaj Patek, distribuis ĉe strategie taŭgaj punktoj interne de la tendaro la tutan presaĵon dum tri tagoj, alparolante la preterpasantajn skoltjn klarigante al ili la grandan avantaĝon de Esperanto, precipe por internaciaj movadoj. Trovoĝis akceptemaj kaj interesemaj gejunuloj. Ni krome atentigis ilin pri kontakt-adresoj kaj pri eblecoj por kursoj.

Imagu, gesamideanoj, neniu de tiuj-ĉi rifuzis nian informagadon. Do estas perceptebla juna aro, estis preskaŭ sensacia sperto por mi persone.

Mi sciiĝis, ke en kelkaj landoj jam ekzistas etaj grupoj de Esperantistaj skoltoj.

Nun estu afero de la Esperantistaj funkciuloj, daŭrigi tiujn kontaktojn al interesuloj kaj pretigi ek-lern-eblecojn.

Bonan padon! Saluton!

## Skoltoj:
## Tendaro por komencantoj

En la pola Bielsko-Biała inter la 1-a kaj 10-a de julio okazis tendaro de Skolta Esperanto-Ligo SKOLTO '91 kun preskaŭ 50 partoprenantoj el kvin landoj. La plej multaj estis komencantoj pri la lingvo, sed en la fino la programo jam senĝene povis realiĝi sen tradukoj. Estas planataj pliaj skoltaj aranĝoj, kristnaske en Belgio kaj fine de julio 1992 en Germanio. Informojn donas: Martin Bähr, Ladenbeckerfurtweg 256, D-W-2050 Hamburg 80, tel. +49-40-7385146. (Anna Ritamäki)

## NOVA SEKRETARIO SERĈATA

**Nia Ligo serĉas nun, post eksiĝo de David, novan sekretarion. Tiuj, kiuj interesiĝas pri la tasko, do prezentu sin perletere al la adreso de David, kun ne tro longa biografieto kaj parolante speciale pri sia vivo en la Esperanta kaj Skolt(in)a Movadoj. Adreso vidu en la lastan paĝon.**



*Skolta Tendaro "Grenzenlos"*
*23 julio–2 aŭgusto, Germanio*

## NI PARTOPRENU SENLIME....

Ni planas partopreni en la tendarego GRENZENLOS(Senlime) en Germanio. Gi okazos la 23.7.-2.8.92. La ideo estas starigi esperantan ge - skoltan unuon. Kontentiga scio de esperanto estas necesa.

Tendarloko: Ferschweiler Plateau apud Bitbug/Eifel en la Nacia Parko.
Partoprenantoj: Geskoltoj 11 ĝis 18 jaraĝaj, roveroj k. estroj.
Prezo: 215 DM. Estas rabato je 10DM se vi alvenas trajne, bicikle aŭ piede.
Aliĝo: Pere de via landa skolt(in)a asocio kaj menciu vian intereson partopreni la Esperantan Trupon de SEL. Sendu kopion al la prizorgantoj, kiuj organizos la grupon.
Pliajn informojn petu al:

| | | |
|---|---|---|
| Martin Bähr | aŭ | Carola Antskog. |
| Ledenbeker Furtweg 256 | | Källkullen |
| D=W-2050 Hamburg 80 | | SF-25700 Kimito |
| Germanio | | Finnlando |

## INTERNACIA SKOLTA TENDARO EN KREMICA -ĈEĤOSLOVAKIO

La invito estas por partopreni en ĉi tiu tendaro, en Kremica, Slovakio. La montaro de Kremica estas ja turisma kaj repoziga centro. Estos kutimaj skoltaj aktivecoj kiel tendarfajroj, spurado, kantado, k.t.p. La kotizo estas ĝis 01.05.92 de 4.700 Belgaj Frankoj por okcidentaj eŭropanoj aŭ 1.630 KCS por eks-socialismaj landoj.

Kontakadresoj:

| | |
|---|---|
| Ĉeĥoslovakio | Pollando |
| Jana NESPOROVA | Georgo HANDZLIK |
| Tajomskeho 32/42 | ul. Braterska 41 |
| Ziar n/Hronom | 43-346 Bielsko-Biala |
| CS-96501 | |



Kaj ceteraj landoj:
Arie Boumann, Driesdreff 8, B-9030 Gent, Belgio
tel. -32-0-91 27 48 41.

HIMNO DE LA KOREA MONDA JAMBOREO 1991


# DES PAYS, UNE SEULE TERRE


## *Le chant du Jamboree*

Compositeur: Kim, Hee Kap
Paroles: Raymond F. Sullivan




1. Joignez-vous à ce chant, et prenez ma main dans l'espoir d'un monde meilleur! Prenez ma main! Chantons ensemble! Chantons le chant du Jamboree! — Dansons le chant du Jamboree! Jamboree! De nombreux pays sont venus! Jamboree! Ici le monde ne fait qu'un! Jamboree! Ici nous sommes tous amis! Chantons ensemble! Jamboree! Paix! Nous chantons! Jamboree.
2. Joignez-vous à cette danse, et montrons notre amour pour l'amour de la compréhension! Prenez ma main! Chantons ensemble! Chantons le chant du Jamboree! Dansons le chant du Jamboree! Jamboree! Nous sommes jeunes et forts! Jamboree! Ici nous sommes joyeux! Jamboree! Ici en harmonie et en paix! Nous chantons! Jamboree.





NE PREOKUPIĜU SE VI NE HAVAS DORMO-SAKON, EKZISTAS MANIERO KIEL SOLVI LA PROBLEMON. PRENU LANKOVRILOJN AŬ ION SIMILAN, KAJ SEKVU LA DESEGNOJN KIEL ONI MONTRAS ĈI TIE. ILI JA ESTAS FACILAJ KAJ UTILAJ POR DORMI SEN PROBLEMOJ KIAM VI FORGESIS KUNPORTI LA VIAN (ĈU?)



Ofte ni havas problemojn kiam oni devas kunigi tri lignerijn. Tio ĉi okazas en konstruaĵojn kiel turoj kaj similaj. Do, jen estas la solvo de via problemo!
Vi nur devas premi tre forte ĉe la komenco, kaj tre firme asekuri ĝin en la fino.






Tegnap a Budai várban ünnepélyes keretek között felavatták Teleki Pál egykori miniszterelnök és főcserkész emléktábláját. Az ünnepségen részt vett unokája dr. Teleki Pál is. Képeinken Ligeti Imre Budapest I. kerületének polgármestere leleplezi az emléktáblát, mely előtt lerótták tiszteletüket az idősebb és ifjabb cserkészek.

FOTÓ BAHKUTI ANDRÁS



La ĉi-apuda foto el iu ĵurnalo de Hungario, montras al ni ke la skolta movado viglas denove en tiu lando, kie oni faris Mondan Ĵamboreon, en Gödöllö. Tiam oni an kaŭ ekuzis Esperanton kiel oficiala lingvon. Baldaŭ venos la tagon, kiam nia kara lingvo estos oficialigita dum monda ĵamboreo. Ni devos labori tiucele, dume partoprenu en la internaciaj renkontiĝoj. Sed la foto temas pri la festado de la unua stratan ŝildon memorigante la unuan skolton en Hungario: D-ro Pál Teleki.

************

## SOROKABA ESPERANTO-KLUBO INSTRUIS E-ON AL GESKOLTOJ

Ni ĝoje ricevis la bultenon "Internan Informilon" de Sorokaba Esperanto-klubo, el Brazilo. Gi informas ke 6 geskoltoj finis kurson pri Esperanto organizita de SEK. Instruistino estis Denize V. Bruno el San Paŭlo, kaj Susana M. V. Carvalho. La geskoltoj apartenas al Don Boska Grupo el Sorokabo.



Kontakadreso estas tiu de la Klubo: Sorokaba Esperanto-Klubo, Caixa Postal 234, BR-18001 Sorocaba SP, Brazilo.

# Ludoj Ludoj Ludoj

MATERIALO: La ŝuoj de ĉiuj la partoprenantoj.
Tri aù kvar bariloj kiel tenis-rakedoj sur longaj mastoj.
Du podioj je 2,5 metrojn altajn.

FORMACIO: Du teamoj kun samnombra kvanto da partoprenantoj.

LUD-DISVOLVO: Unu ludanto de ĉiu teamo estas la "spiono" kiu devas kapti la ŝuojn jetitajn. Ili estas lokitaj sur la podio ene de la kampo de la alia teamo.

Tri aù kvar ludantoj prenas la barilojn kaj klopodas eviti ke la spiono kaptu ŝuojn. La ŝuoj, kiujn kaptis la spiono, devas esti metita en speciala truego de la podio. La aliaj ludantoj ĵetas ŝuojn super la alia teamo klopodante ke ili estu kaptitaj de la spiono kaj tiel noti poentojn. Ne gravas ĉu la ŝuo apartenas al unu aù al la alia teamo, nur gravas ĉu ili estis kaptitaj de la spiono kaj metita ene de la truego. Gajnas la teamo kiu povas kapti pli da ŝuoj.

VARIANTO: Pro tio ke konstrui podiojn estas io malfacila, oni povas anstataùi ilin per manpilkaj ringoj aù similaj. Do, tiam ne estos bezonate la spionojn.




**JAM APERIS PASPORTA LIBRO....**

**Vi povas mendi ekzempleron el U.E.A. kaj la prezo estas 18 NLG.**

**La ĉi-jara listo enhavas 900 adresojn el 59 landoj kie eblas visiti pere de P.S.**

**Se vi deziras aliĝi al P.S. kiel gastiganto, skribu al Rob KEETLAER, Postbus 2310 NL-1000 CH, Amsterdam, Nederlando. Bv. ne peti de li la Pasportan Liston, sed rekte al UEA!!!**

# VI ESTRUMOS IAM...

Se vi deziras, vi estrumos iam.
Eble ne hodiaŭ nek morgaŭ, sed kiam estos tempo.
Kiam via vivo estu rekta kiel junka trunketo
kaj simpla kiel alaŭda kanto.

Estrulo ne estas tiu, kiu deziras ordoni, aŭ
imponi sin. Nek tiu, kiu ordonas por esti obeita.
Nek tiu, kiu permesas aŭ malpermesas;
tiu, kiu malaprobas aŭ alaŭdas;
tiu, kiu premias aŭ punas.

Estrulo estas multe pli ol tio.
Estrulo estas tiu, kiu sen voli aŭ scii ĝin,
altiras al li aliulojn.
Estas tiu, ĉirkaŭ kiu ni ŝatas sidiĝi.
Estas tiu, kiun ni aŭskultas kaj postsekvas,
ĉar ni malkovras en li forton, kiun n nie povas
detrui; ke lia vivo estas rekta kaj liaj agoj
simplaj.
Ĉiam egala, simpla; kiel lia kvieta rigardo,
kiu ŝajnas veni de malproksime kaj iri ankoraŭ
pli malproksime, ĝis la fundo de l' koroj
kaj pli for el horizonto.



Estrulo.... Certe tre bone estus havi unun
kiam ni lacas.
Iu, kiu helpus nin pensi. Kiu helpus nin decidi
kaj kiun ni povus postsekvi.
Sed tiaj estruloj estas malmultaj.
Almenaŭ tiuj, kiuj oni povas fidi.

Se vi deziras, vi estrumos iam.
eble ne hodiaŭ nek morgaŭ, sed kiam estos tempo.
Kiam via vivo estu rekta kiel junka trunleto
kaj simpla kiel alaŭda kanto.

Estrumi ne signifas transformi la aliulojn,
por farigi ilin kiel vi, altrudante viajn ideojn
al ili; lacigante ilin kun konsiloj, malpermesoj
kaj ordonoj.

Estrumi signifas vivi puran vivon, ĉiam
en malferma domo por ĉiuj...




Ke tiuj, kiuj deziras viziti vin,
neniam trovu fermitaj la pordojn, nek la fenestrojn;
ĉar estrulo vivas antaŭ ciuj, por ĉiu kaj kun ĉiuj.
Estrulo postulas troe de si mem, sed nenion el aliaj.
Estas severa kun si mem, kaj pardonema kun la aliaj.
Scias tre bone, ke ne estas facila fari aĵojn kaj
ke preskaŭ ĉio postulas penon.

Estrulo estas kunulo, kiun vi rekonas kiel pli bona
ol vi, kaj kune al kiu vi pliboniĝas.

Tial, vi elektis lin.
Tial, vi eldiras "mia estrulo".

Se vi deziras, vi estrumos iam.
Eble ne hodiaŭ nek morgaŭ, sed kiam alvenos la tempon.
Kiam via vivo estu rekta kiel junka trunketo
kaj simpla kiel alaŭda kanto.




==========================================================
LA SKOLTA MONDO Nº13, Volumo 7, 1992. Oficiala organo de Skolta Esperanto-Ligo (SEL). Prezidanto: Franco Abrianni, Via Falconetto 24, I-37131 Verona VE, Italio. Ĝenerala Sekretario: David H. Withey, 21 Brookfield Ave Waterloo, Liverpool, Britio L22 3YE. Kasisto: Christopher Archer, 9 Moor End Terrace, Belmont, Durham, Britio DH1 1BJ. Redaktoro: Héctor R. Campos Grez, Casilla 231, Curicó, 7ª Regiono, Ĉilio. §92.04.30§
Presita ĉe Ĉilia Geskolta Asocio - Ĉilio.
==========================================================